



Enhavo

- AMO 64 v –prelego el Koreio
- D-ro So Ĵinsu, estrarano de UEA
- K-filmo, K-pop, K-prevento

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.



EKO 2020-27 sendita el Budapeŝto, la 12an de majo

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Ni dronas en AMO

Al ricevantoj de EKO-komunikoj ni pardonpetas pro la diluvo de komunikoj. Sed ni havas agrablan devon dissendi senprokraste la rezultojn de la 64a Seminario pri Aktivula Maturigo. Jen la prezentaĵo de d-ro So Ĵinsu el Koreio. Tra la tuto la prefikso <K-> signifas <Koreio> aŭ <Korea>. Pro la abunda uzo de fotoj, la PDF eĉ post sveltigo restas multe pli peza ol ni kutimas dissendi kun EKO. Ni pardonpetas kaj esperas, ke tio ne donas problemojn al iuj ricevantoj. Ni kutime strebas sendi alkroĉaĵojn kun pezo malpli ol 1 megabajto. Eksterordinaraj tempoj, eksterordinaraj paŝoj.

Ni solene promesas lasi minimuman paŭzon de unu monato ĝis la sekva AMO-seminario, por permesi al ni dissendi la komunikojn malpli intense. Tamen, pro la pandemio, la kvanto de konigindaj informoj eksponente kreskas. Ni ĉiam pli rigore elektos la aperigotajn.

Vortoj: 145

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.